

juna amiko

novembro 2017 • n-ro 4/2017 (153) ←



PROGRESIGA REVUO
POR LEGEMULOJ
INTER 10 KAJ
100-JARAĜAJ

Surpriza koncerto
Konversaciaj temoj
Telefono fariĝis 140-jara
Projekto "Esperanto-Poŝtkruciĝo"

Kukuo la feo

Aŭtoro: Ángel Velazco Tradukisto: José de J Campos

POR ANĜEL VELAZCO

Ha, ha mi havas sakon plenan je oranĝoj por mi sola.




Sed... .. miaj amikoj



Dankon, Kukuo.



Dankon, Kukuo.



Dankon, Kukuo.



Restas nur unu, nun...



Kukuo!



Nun, ni kundividos niajn manĝetojn.





Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: La perdita identiga karto (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 9



Nature: Ursoj (Jose de J. Campos Pacheco, CU) 10



Inventoj: Telefono fariĝis 140-jara (Renée Triolle, FR) 12



LUDE, la unika dua etaĝo: Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro (Mónika Molnár, CH) 14



Esperanta mono: Unu mondo, unu lingvo, unu mono? (ijk, CZ) 17



Legu kaj ĝuu: Celebrado de legado. Ekkonu Ukrainion.

Malstreĉiĝu. (Małgosia Komarnicka, PL) 18



Kantu kun Juna Amiko: La sorĉa kanto-mondo (Małgosia Komarnicka, PL) 24

Muziko: Surpriza koncerto (Blanka Laslo, RS) 25



Interkultura Mondo: Projekto “Esperanto-Poŝtkruciĝo” (Elena Nadikova, RU) 26



Helsinki Julopado... Pado al Kristnasko (Raita Pihälä, FI) 30



Recenzo: Trezoro de porinfanaj poemoj (Luiza Carol, IL) 32

Fabelo: La Stelrakonto (Luiza Carol, IL) 35



LASTE: 10-vorta krucenigmo. Solvo el la antaŭa numero (Stefan MacGill, HU/NZ) 38

Landaj Perantoj 39

Dorspaĝe: 46-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) en Seulo, Koreio




Eldonanto de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Reĵeto**: sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro**: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Mayer (DE). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto**: Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto**: Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en februaro 2018. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

Nia revuo aperas 4-foje jare, same kiel la kvar jarsezonoj (sur la norda hemisfero). Tio iom sentblas ankaŭ en la kontribuajoj. Niaj rolantoj nun portas pli varmajn vestojn, ie jam aperas neĝo, la bestoj preparas sin por la vintro, el sekigitaj plantoj ni povas fari belajn ornamaĵojn aŭ bildojn, apud la finna urbo Helsinki oni preparas sin por “Julopado”, okaze de la proksimiĝanta Kristnasko.

En la numero vi trovos ankaŭ artikolojn pri la invento kaj evoluo de telefonoj, pri niaj deziroj kaj iliaj plenumoj (bongustaj manĝaĵoj en la rubriko LUDE), pri Esperanta mono; vi legos interesajn librojn pri la vivo en brazila bieno kaj humurajn poemojn el tiu lando; ni



ekkonos Ukrainion, kantos kun *Juna Amiko* kaj ĉeestos belan koncerton kun juna serba esperantistino en Kroatio.

Nia rubriko “Interkulturo” invitos vin al la nova projekto “Esperanto-Poŝtkrucigo”, dank’ al kiu vi povos korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kaj mesaĝojn kun amikoj en la tuta mondo. En la fabelo “Stelrakonto” vizitos nin homo el alia galaksio kaj montros al ni strangan kvinpintan stelkaroton. En la numero vi trovos ankaŭ bildstrion pri la

feo Kukuio, krucenigmon en la rubriko LASTE kaj fotojn pri la 46-a Internacia Infana Kongreseto en Koreio. La sekva, 47-a IIK, okazos 28 jul – 04 aŭg 2018 en Portugalio kaj ĝia temo estos “Delfenoj kaj dinosaŭroj”. Vidu: <http://bertosch.free.fr/iik2018/> – Agrablan legadon!

Via redaktoro **Stano Marček**

Karaj legantoj!

En tiu ĉi numero de *Juna Amiko* vi legos pri la studado de Blanka Laslo pri ludado de violonĉelo.


Vi legos pri ŝi, vi vidos ŝin sur du fotoj. Bedaŭrinde ni ne povos aŭskulti ŝin! Ŝajnas, ke ŝia nivelo jam estas alta, ĉar ŝi ludas la suitojn de Bach. Dum jaroj mi oftege aŭdis violonĉelon ĉiun tagon, ĉar mia filino Marion (vidu foton) studis la ludadon de tiu belega instrumento. Do tiujn suitojn, sinsekvojn de diversaj dancmuzikoj, mi multe aŭdis. Sed pri violonĉelo unu el miaj plej impresaj rememoroj estas koncerto fine de majstrokurso de Paul Tortelier en La Chaux-de-Fonds, Svislando. Li arigis ĉiujn violonĉelistojn de sia klaso kaj obtenis tiel orkestron el



24 violonĉeloj! Tiu orkestro ludis pecon, kanton, de Tortelier mem: “La granda standardo”, kiu prezentas unue militecan muzikon kaj transiras al paca melodio. Tuj poste mi petis de li la permeson traduki la parolojn de tiu kanto al Esperanto. Li konsentis. Per konkurso en la organo de Muzika Esperanto Ligo ni akiris Esperanto-tekston de tiu belega muzikpeco, kies enhavo multe similas al la interna ideo de Esperanto. Se iu leganto interesiga pri tiu verko, bonvole skribu al mi.

Studi muzikinstrumenton iom similas al lingvolernado: granda kaj konstanta laboro endas por atingi bonan nivelon per etetaj ĉiutagaj progresoj. Sciu, ke la infanoj, kiuj praktikas muzikinstrumenton, havas pli bonajn rezultojn en la lernejo!

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI



La perdita identiga karto

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

I. La malagrabra malkovro

Amalia (A) kaj Berta (B), la du amikinoj, babilas sur la strato, direkte al la Urba Biblioteko. Poste en la parfumvendejo, kun la vendistino (V).

- A - Terure!
 B - Kio okazis?
 A - Mi perdis ĝin!
 B - Kion?
 A - Mian identigan karton! Ĝi malaperis!
 B - Kio okazis al via identiga karto?
 A - Mi ja diras, ke mi perdis mian identigan karton!
 B - Kiel vi perdis ĝin?
 A - Mi ne scias!
 B - Sed kie ĝi estis?
 A - Kiel! Ĝi estis en mia mansako, kompreneble!
 B - Nun vi ne povas enskribiĝi al la Biblioteko. Tie oni petas prezenti la identigan karton.
 A - Kion ni nun faru?



- B - Ni pripensu, kie ĝi povas esti! Kie ni estis?
 A - Ni butikumis, ni trinkis kafon kaj manĝis kukon en la kafejo.
 B - En la kafejo pagis mi, kaj do tie ĝi ne povis resti. Eble vi forgesis ĝin en la parfumvendejo. Ni kuru tien, ĉar ĝi ne estas malproksime!
 ...
 A - Bonan tagon! Bonvolu...
 V - Saluton! Pri kio mi povas helpi vin? Ĉu vi forgesis ion?
 B - Sinjorino, mi ie perdis mian identigan karton. Mi interesiĝas, ĉu eble ĉi tie.
 V - Kiam vi butikumis ĉe ni?
 A - Nun estas la dekonua kaj duono. Mi pensas, ĉirkaŭ la deka horo, hodiaŭ, post la malfermo de la butiko.
 V - Bedaŭrinde, ne! Mi senpolvigis la internajn vitrinojn tuj post via vizito, sed nenion mi trovis.
 A - Dankon. Ĝis revido!
 V - Ĝis revido, fraŭlino!
 ...

- B - Ĉu estas trovita la identiga karto?
 A - Ĝi ne restis en tiu vendejo! Ĉu eble iu ŝtelis ĝin en la kafejo?
 B - Oni ŝtelas malofte identigan karton. Sed, ĉu vi kunhavas vian monujon?
 A - Ho! Momenton! Mi devas kontroli tion! Jen mia monujo! Mi trankviliĝis, ke almenaŭ la monujon mi ne perdis!
 B - Amalia, provu kontroli denove vian mansakon! Eble ni retrovos vian identigan karton! Ĉi tie, sur tiun benkon ni metu la enhavon de via mansako, unu aĵo post la alia!
 A - Bone, ni provu! Jen, paperaj naztukoj, ŝlosiloj por la loĝejo, monujo, lipruĝo, speguleto, unĝofarbo, ĵus aĉetita, poŝtelefono, senodorigilo, dentobroso,





plia naztuko, sunokulvitroj,
vojaĝabono, poŝkalendaro...

- B – Kial vi bezonas poŝkalendaron? Ĉu ne
sufiĉas la poŝtelefono por noti datojn?
- A – Mi preferas mane noti ilin, kaj tie estas
ankaŭ adresaro.
- B – Kio restis ankoraŭ en via mansako?
Ĉu ĝi estas jam malplena?
- A – Estas ankoraŭ libro, kiun mi nuntempe
legas.
- B – Rigardu! Io estas en ĝi! Ĉu ne via
identigilo?
- A – Ne, ĝi estas mia universitata karto. Mia
identiga karto estas definitive perdita!
Nun kion mi faru?
- B – Mi proponas, ke ni anoncu tion en
la policejo. Eble iu trovis ĝin... Kaj
almenaŭ oni donos iun dokumenton al
vi, por anstataŭigi la karton!

II. Aventuro ĉe la policejo

**Amalia (A) kaj Berta (B), la du
amikinoj, babilas en la policejo, kun
policisto (P₁) kaj policistino (P₂).**

- B – Jen la policejo! Ni enirul!
- P₁ – Bonan tagon! Kion vi deziras?
- A – Bonan tagon! Ni deziras anonci, ke...
- P₁ – Unua etaĝo, maldekstre de la ŝtuparo,
kvara pordo. Bonvolu doni vian
identigan karton!



- A – Mi venis ĝuste tial... Mi perdis ĝin.
Eble iu ŝtelis ĝin... nun mi ne scias...
- P₁ – Mi komprenas. Jen slipeto, skribu sur
ĝin viajn nomon kaj naskiĝjaron. Bone.
Dankon. Kaj jen, gardu tiun ĉi bileton,
kaj revenante vi devos transdoni ĝin
al la deĵoranta policisto!
- A – Dankon. Kaj kien...?
- P₁ – Unua etaĝo, pordo kvar! (al Berta.)
Ĉu ankaŭ vi perdis ion?
- B – Ne, mi nur akompanas mian amikinojn.
- P₁ – Do, se tiel, vi povas atendi ŝin; vi
povas sidiĝi; tie troveblas benkoj.

...

- P₂ – La sekva kliento envenu, numero
dekkvin! Bonan tagon; bonvolu sidiĝi.
Donu al mi vian bileton, mi petas! Pri
kio vi deziras fari anoncon?
- A – Bonan tagon! Mi perdis mian
identigan karton. Aŭ eble iu ŝtelis ĝin.
- P₂ – Kiam tio okazis?
- A – Hodiaŭ. Hodiaŭ matene mi jam ne
trovis ĝin. Mi aĉetis ungo-farbron en
parfumvendejo, poste ni kafumis kun
mia amikino, kaj poste mi jam ne
trovis ĝin.
- P₂ – Ĉu vi ne lasis ĝin ie, dum butikumado?
- A – Ne, mi jam kontrolis. Oni ne retrovis
ĝin.
- P₂ – Ni atendu kelkajn tagojn; eble ĝi estos
retrovita. Se ne, vi ricevos novan
identigan karton. Ĝis tiam ni preparos
por vi atestilon pri via identeco. Kio
estas via plena nomo? Bonvolu diri
vian familian nomon!
- A – Mi nomiĝas Amalia Grandokula.
Mia familia nomo estas Grandokula.
- P₂ – Kaj via pli frua nomo? Ĉu tiu ĉi estas
via unua nomo?
- A – Jes.
- P₂ – Kiam vi naskiĝis?
- A – En 1998, la 4-an de aŭgusto.
- P₂ – Kie?
- A – Ĉi tie, en Belurbo.
- P₂ – Kiel nomiĝas via patro?
- A – Lia nomo estas Karlo Grandokula.



- P₂ – Bone... Nun bonvolu diri la fraŭlinan nomon de via patrino.
- A – Ŝia nomo estis Anastazia Verdkora.
- P₂ – Necesas ankoraŭ via konstanta adreso.
- A – Mi loĝas en Belurbo, en la dua distrikto, en strato Palaco, dek sep.
- P₂ – Bonvolu diri ankaŭ la poŝtan kodon!
- A – Dudek-du, tri tri tri.
- P₂ – Ĉu vi ne havas alian adreson?
- A – Ne, mi ne havas. Mi ĉiam loĝis ĉi tie, ekde mia naskiĝo.
- P₂ – Mi nun faros rapidan bildon pri vi. Kaj kun tio mi printos la dokumenton. Tiu ĉi dokumento anstataŭos vian identigan karton. Jen. Por via nova identiga karto vi devos alporti diversajn dokumentojn, oficialan atestilon de la distrikta direktorado pri via loĝloko. Alportu ankaŭ dokumenton de via lernejo, kie estas viaj nomo, adreso kaj naskiĝdato. Krome, la originalan atestilon pri via naskiĝo.
- A – Kiel mi povos akiri ĝin?
- P₂ – Ĉiuj ricevas tion, je naskiĝo, jam en la hospitalo, se via patrino naskis vin tie. Demandu viajn gepatrojn, ili certe havas tiun gravan oficialan skribajon!

III. La objektoj tamen ne malaperas

Amalia (A) kaj ŝia patrino(P) babilas en sia loĝejo.

- P – Kie vi forestis tiel longe, filineto mia? Vi diris, ke vi revenos por tagmanĝo, kaj jam estas preskaŭ vespero!
- A – Ho, Panjo, imagu, kio okazis! Mi perdis mian identigan karton, kaj mi devis anonci tion ĉe la policejo!
- P – Terure! Kie vi perdis ĝin?
- A – Mi ne scias!
- P – Kion oni diris en la policejo al vi?
- A – Oni pridemandis min, kie mi perdis la

identigan karton, kio estas mia nomo, kie mi loĝas, ĉu mi laboras aŭ lernas. Mi ricevis tiun ĉi paperon, por identigi min, se necese.

- P – Kaj kiam vi ricevos novan identigan karton?
- A – Ho, Panjo, tio estos verŝajne longa afero! Unue mi devas ekhavi diversajn dokumentojn. Necesas pruvi, kie mi naskiĝis, kie kaj kiel mi loĝas, ĉu mi vere estas lernanto. Mi jam akiris tiun paperon en la universitato, bonŝance.
- P – Kiam via paĉjo estos alveninta hejmen, demandu lin pri la atestilo de via naskiĝo. Ĝi estas aŭtenta eltiraĵo de matrikulo pri naskiĝoj, kaj li zorgeme gardas ĉiujn gravajn dokumentojn. Vi povas akiri la atestilon pri la loĝado ĉe la distrikta administrado.
- A – Morgaŭ mi ne povos iri tien; mi havos lecionojn dum la tuta tago!
- P – Dum mi preparas la vespermanĝon, telefonu al la oficejo kaj demandu, de kioma ĝis kioma horo oni laboros morgaŭ kaj postmorgaŭ.

...

- A – La oficejo havas tri telefonnumerojn, sed neniun respondas!
- P – La oficejo ne estas malproksime, kaj do vi povos rapide iri tien, por rigardi la horaron.
- A – Sed Panjo! Jam estas malfrue! Krome denove pluvas! Ni baldaŭ vespermanĝos!
- P – Ni vespermanĝos, kiam Paĉjo alvenos. Vi devas akiri la atestilon pri via hejmo, alikaze oni ne preparos novan identigan karton por vi! Prenu vian pluvombreton, kaj urĝu! La tuta vojo tien kaj reen daŭros ne pli ol dek kvin minutojn! Filineto, surmetu ankaŭ ĉapon, estas malvarme jam!
- A – Sufiĉas la pluvombrelo! Mi kuros!
- P – Ĝi ne sufiĉas! Bonvolu preni vian ĉapon! Vi ne malvarmumu!
- A – Ĝis, Panjo, mi jam vere kuras, ĉapon mi ne bezonas!





P – Filineto, atendu! Mi jam estas
prenonta vian ĉapon el la ŝranko...
Ho! Io falis el ĝi! Kio ĝi estas?
Nekredeble! Amalia! Amalia, revenu!
Via identigilo estas trovita!

Taskoj

I.

Legu atente la dialogojn (eblas du- aŭ trifoje), kaj respondu la demandojn:

- Kien volis iri Amalia kaj ŝia amikino?
- Kion ne trovis Amalia?
- Kie ŝi serĉis la perditan identigan karton?
- Kiun demandis Amalia pri la identiga karto?
- Kion decidis la amikinoj?
- Kien ili iris kaj kial?
- Kiu haltigis ilin ĉe la enirejo de la policejo?
- Kion petis la policisto de la fraŭlinoj?
- Kien estis sendita Amalia kaj kiucele?
- Kie atendis ŝin ŝia amikino?
- Kiujn demandojn devis respondi Amalia?
- Kie kaj kiam naskiĝis Amalia?
- En kiu urbo loĝas Amalia?
- Kiucele oni preparis foton pri ŝi?
- Kiujn dokumentojn devas akiri Amalia?
- Kion Amalia rakontis al sia patrino, alveninte hejmen?
- Kion konsilis la patrino al Amalia?
- Kien devis iri Amalia antaŭ la vespermanĝo?
- Kial ŝi devis iri tien?
- Kia estis tiam la vetero?
- Kion konsilis la patrino al Amalia, por kunporti kaj surmeti?
- Kiel opiniis Amalia pri tio?
- Kio falis el la ĉapo de Amalia, kiam la patrino elprenis ĝin el la ŝranko?
- Rakontu, kiel tio povis okazi!

...

Respondinte ĉiun demandon, provu rakonti, kio okazis, sen rigardi la tekston!



II.

Demandu vian lernopartneron pri la naskiĝdato kaj loko, pri la fraŭlina nomo, pri la fraŭlina nomo de la patrino, pri la loĝloko kaj laborloko! Poste, ŝanĝu la rolojn, kaj vi respondu la demandojn! Rakontu, kiujn objektojn gardis Amalia en sia mansako!

Prezentu, kiujn objektojn vi kunhavas en via mansako aŭ/kaj en via poŝo! Rakontu, al kiuj instancoj devis turni sin Amalia pro la perditaj identigilo!

III.

Rakontu, kie vi devas anonci, se vi perdas vian

a) identigan karton; **b)** stirpermeson; **c)** vian vojaĝpasporton! Kiujn dokumentojn vi devas akiri, se vi perdas vian identigan karton? Komencu dialogon kun via lernopartnero (aŭ skribu dialogon) pri tio, ke vi trovis ies monujon kun mono, bankokarto kaj stirpermeso!


Rakontu (aŭ skribu letere al via esperantista amik(in)o), vian (imagitan) aventuron, kiam vi perdis iun gravan dokumenton!

El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, beston kaj homojn! Kion ili faras? Kiajn vestojn portas la homoj? Kiajn kolorojn havas la objektoj, besto kaj vestoj? Kio okazas sur la bildoj? Ĉu ili estas egalaj?



Kolorigu! Trovu la 9 diferencojn!



Jose de Jesus Campos Pacheco

Ursoj

Ursoj estas grandaj, preskaŭ senvastaj, ĉionvoraj kaj ofte danĝeraj rabobestoj, kiuj havas fortajn makzelojn kaj fortegajn krurojn. Ili lerte fosas kaj grimpas, kaj ili nutras sin per diversajoj kiel beroj, larvoj, fiŝoj kaj aliaj bestoj.

Unu el la plej grandaj ursoj estas la **blanka polusa urso**, kies tereno estas Arkto kaj kiu ĉasas fiŝojn kaj fokojn. Iam polusa urso faras longajn vojaĝojn sur flosanta glacipeco. Dum la malvarmega vintro ĉi tiu ursego vagadas suden por eviti neĝostormojn kaj daŭrigi la ĉasadon. Kiam la naskperiodo alproksimiĝas, la ursino ŝirmas sin en kaverno aŭ neĝamaso kaj povas dormi dum kelkaj tagoj. La idoj, kutime ĝemeloj, naskiĝas dum la frua printempo, iufoje eĉ antaŭ ol la patrino vekiĝas. Ili estas nesupozeble malgrandaj kaj povas pezi malpli ol duonkilogramon.



La plej konata kaj disvastigita urso en la mondo estas la **bruna urso**. Ĝi estas trovebla en Norda Ameriko, Eŭropo kaj Azio, kaj povas esti **bruna**, **ruĝe-bruna** aŭ eĉ **nigra**.



Alasko estas la hejmo de granda speco de ĉi tiu urso, kun la nomo **griza urso**. Ĝi povas atingi alton de preskaŭ 3 metroj kaj pezi ĝis 450 kilogramojn.

Hindio (Barato) formas la terenon de la **Mielurso**, malgracia kaj nealloga urso, kies brusto kutime portas blankajn striojn en formo de litero V. Per la longaj ungegoj ĝi



Granda pando, ofte nomata nur **pando**, estas specio de “veraj” ursedoj. Ĝi ankaŭ nomatas bambumanĝanto.




Ĝi estas simbolo de *World Wide Fund for Nature* (Monda Natur-Fonduso) – nuntempe WWF® WWF, internacia ne-registara organizo por protektado de la naturo kaj de la medio, tre agema pri daŭripova evoluo. Ĝia sidejo troviĝas en Gland, en Svisio. Ĝi havas pli ol 4,7 milionojn da donacantoj en la mondo kaj disponas pri operacia reto en pli ol 96 landoj. La celoj de la organizaĵo estas protektadoj de bestoj, homoj kaj naturo (<https://eo.wikipedia.org/wiki/WWF>). Ĝiaj ĉefaj agadoj estas: superrigardo de la aplikado de internaciaj regularoj; restaŭrado de naturaj lokoj; edukado. Ĝia simbolo estas la pando.

En 1869 Armand David informis pri grandaj pandoj en Ĉinio, kio vekis atenton de la mondo. Kiel valora donaco de la ĉina registaro por aliaj landoj, grandaj pandoj semis amikecon inter diverslandaj popoloj. Tiu specio estas rara besto en Ĉinio kaj vivas en profunda valo kaj densa bambuaro ĉe la orienta fino de la Ĉinghai-Tibeta Altebenaĵo, okcidenta Ĉinio. En la pasintaj jardekoj, pro ŝanĝiĝo de la natura medio kaj malvastiĝo de viv-tereno, ekzistas malpli ol 1000 grandaj pandoj en la mondo. Pri ilia nuna stato oni tre zorgas.

fosas en la teron por kapti termitojn kaj disŝiri termitejojn. Ofte ĝi serĉas nutraĵon en rubajamasoj.

Multaj ursoj estas admirindaj patrinoj, kiuj instruas al la idoj kiel serĉi taŭgan nutraĵon kaj kiel grimpi. Kiam evidentiĝas danĝero, aŭ kiam ŝi volas ĉasesplori, la patrino lokigas la idojn sur arbon, por ke ili restu tie ĝis ŝia reveno. Sed kiam ili estas pli aĝaj, ŝi iun tagon senbrue foriras kaj neniam revenas. Eble tio ŝajnas esti kruela ago, sed tamen ĝi estas rimedo por instrui al la idoj, ke ili maturiĝis. Kvankam la groteskaj movoj de urso povas amuzi nin, ni devas ĉiam trakti ĝin kun granda zorgo, eĉ se ĝi estas dresita, ĉar ĝi estas nefidinda. La vizaĝesprimoj neniam ŝanĝiĝas kaj oni malfacile povas diveni la humoron de la besto.






Renée Triolle

Telefono iĝis 140-jara

Depende de via loĝloko, vi eble ne povas imagi vian vivon sen telefono, kaj supozeble vi forte timas, ke viaj gepatroj punos vin, se vi tro uzas ĝin.

Ĉu vi scias, kiu inventis tiun miraklaĵon? La skota instruisto Alexander Graham Bell (1847-1922).

Kial venis al li la ideo? Ĉar liaj patrino kaj edzino estis – surdaj. Li ŝatis muzikon, studis sciencojn de sonoj (akustikon), kaj lernis la signolingvon. Li eksperimentis pri tekniko, observante la movojn en la gorgo, por ke surduloj kopiu ilin, kaj sur la frunto de la patrino li perceptis la sonojn. Li kreis artefaritan orelon, parolantan maŝinon, telegrafon. En marto 1876 li eksperimentis pri sistemo, kiu transformis la parolon en elektrajn impulsojn kaj unuafoje en la historio uziĝis “telefono”: – “Venu Watson, mi bezonas vin”, – jen la unua konversacio kun la helpanto en la apuda ĉambro. Post unu jaro li kreis Bell-kompanion.



Eĉ se la italo Antonio Meucci kaj la usonano Elisha Gray argumentis, ke ili inventis telefonon, la historio konsideras, ke Bell estas la patro de la inventaĵo. Sed tiu saĝulo poste ne havis telefonon en sia laboratorio, ĉar li konsideris ĝin ĝenilo! Bell estis kreema: li patentigis 14 patentojn pri telefono kaj telegrafo, 4 por fototelefono, 1 por fonografo, 5 por flugantaj maŝinoj, 4 por hidroplano, 2 por ĉelo el seleno.

Mi memoras, ke kiam mi estis dekjara, ne estis rekta ebleco telefoni; ni telefonis al centralo kaj telefonist(in)o kunligis nin kun la petita alvokato. Fiksaj





telefonoj devigis la registarojn investi en konstruadon de centraloj, linioj ktp.


La nuna teknologio, la ĉelaj telefonoj, uzas satelitojn, kiujn pagas la ekspluatantaj kompanioj, kiuj, siavice pagigas la telefonantojn. Pro tio en kelkaj regionoj kun maldensa loĝantaro ne eblas uzi la poŝtelefonojn, ĉar mankas “klientoj”.

Kiam vi alvokas amikojn por paroli pri nenio grava, tenu en la kapo, ke por libere babilu, infanoj en aliaj partoj de la mondo devis labori por eltiri rarajn metalojn (en la telefono enestas kelkaj dekoj da ili). Infano pli facile ŝovigas en mallarĝaj minejaj galerioj, por eltiri la necesan krudaĵon, kaj sekve infanoj estas ekspluatataj – pro viaj deziroj! Same, kiam vi emas ricevi la lastan modelon, pensu, ke vi “forĵetas” multajn krudaĵojn, kiuj mankos al la postaj generacioj...

(Bv. legi ankaŭ la artikolon “Rapidega evoluo” en *Juna Amiko* 147, 2/2016, p. 26.)



Ju pli granda la deziro des pli kara la akiro



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**

La vespermanĝo de Kuiremulido estis tiom bongusta, ke Ĝojulido kaj Ulideto preskaŭ lekis poste ĉiujn siajn fingrojn.

Nur pro tio ili ne faris, ĉar ili estis bonedukitaj. Do, bone, ni konfesu, ke Ulideto tamen leketis ilin iomete, kaŝe, sub la tablo, sed li estas ankoraŭ tiom malgranda, ke oni nur ridetis pri tio. Sed malgranda aŭ ne, lia memoro funkcias bonege kaj li tute ne forgesis la diskuton kun Ĝojulido, nek lian postan promeson, tamen li provis unue ruze negoci...


– Kara mia Ĝojulido, ĉu mi preparu la filmon, kiun ni rigardos kun Kuiremulido? Ĉu vi memoras, ni

diris, ke ni tiel dankos lin...

– Ho jes, kara mia sagaca Ulideto, mi tre bone memoras, ke ni parolis pri filmo por la grandaj infanoj kaj pri vespera, antaŭenlitiĝa rakonto por la iom pli malgrandaj. Ĉu mi memoras bone? – ridetis Ĝojulido, kiu tre bone sciis pri la granda deziro de Ulideto, esti konsiderata granda kaj iri litten pli malfrue. Tamen li estis tre respondeca, bona frato.

– Jes, certe... – diris Ulideto kaj rapide aldonis – sed ĝi devas esti tre-tre loooonga!


– Ekzakte! Pro tio mi elektis por vi du rakontojn de Eloïse Marotte [*eloïse marott*']. Rapidu en la liton por aŭskulti ilin.





**Eloïse Marotte:
La muso
kaj
La granda kuniklo**



– Saluton, mi estas Kroki, la muso. Mi ne havas domon. Mi serĉas, serĉas, sed mi ne trovas. Ĉu vi volas helpi min?






– Jes, volonte. Rigardu, tiu ĉi estas tre bela domo. Ĉu ĝi plaĉas al vi? – Jes, ĝi plaĉas al mi, sed ĝi estas tro granda por mi.



- Jen, mi trovis alian domon por vi. Tie kun vi povas loĝi multaj amikoj.
- Jes, sed ĝi estas ankoraŭ pli granda. Eĉ multe tro granda por mi.

- Mi ne plu havas ideon. Kian domon vi ŝatus?
- Ho! Rigardu! Tian! Ĉi tie estas unu domo. Ĝi estas perfekta! Kaj neniu loĝas en ĝi. Perfektege!

- Ĝi estos mia domo, mia kara dometo. Ĉu vi volas manĝi kaj dormi ĉe mi?
- Jes, tre volonte. Dankon! Tre plaĉas al mi via dometo!



- Rigardu mian belan pijamon! Ĝi estas esperanta. Mi pensas, ke post tiuj grandaj domoj mi certe sonĝos pri la granda kuniklo!


- Via pijamo estas vere tre bela, sed pri kiu kuniklo vi parolas?
- Ĉu vi ne konas la rakonton pri la granda kuniklo? Do, aŭskultu!

"Estis foje granda kuniklo, kiu estis tre trista. Ĝi estis tiom trista, ĉar ĝi estis la sola tiom granda kuniklo en la tuta mondo.







Ĝi estis tro granda kaj ne havis amikojn.
- Ne gravas, mi ne bezonas amikon por ludi.
Mi povas ludi sola per mia bela kajto.




- Ho, mi estas laca.
Mi iras hejmen kaj mi preparas manĝaĵojn...
Njam-njam, estas tre bonaj la karotoj, la ovo kaj la salato.



- Post la manĝo mi devas ankaŭ lavi la telerojn.
- diris la granda kuniklo.
- Ho, kiom bone estus, se mi tamen ne estus ĉiam tiom sola...



- Mi estas laca kaj estas jam tre malfrue. Mi iras dormi. Ho, estus bone diri bonan nokton al iu kaj ne nur al mi mem... - kaj ĝi endormiĝis trista."



- Via rakonto estas trista! Espereble ni havos pli belajn sonĝojn en via bela, nova domo.
- Eble. Bonan nokton!
- Bonan nokton, Kroki!

- Jen la fino - diris Ĝojulido. - Ĉu ĝi plaĉis al vi? Ĉu vi kontentas pri la longeco, mia Ulideto? Subite li eksilentis, ĉar la respondo - muziko al liaj oreloj - estis la egalritma spirado de la etulo. Li eliris la ĉambrom sur la pintoj de la piedfingroj, akceptis la gratulojn de Kuiremulido kaj trankvile instaligis antaŭ la televidilo por spekti la merititan filmon kun sia amiko.



La vespero bone finiĝis kaj li estis kontenta, ĉar malgraŭ lia deziro por la filmo, li sukcesis unue certigi trankvilan dormon al la frateto.



Unu mondo, unu lingvo unu mono?

Kiel esperantisto mi interesiĝas ankaŭ pri historio kaj pri historiaj helpsciencoj. Al ili apartenas eĉ la historio de moneroj – numismatiko.

En 80-aj jaroj de la pasinta jarcento mi legis artikolon en la gazeto *Heroldo de Esperanto*, kiu estis por mi tre interesa. La aŭtoro skribis en ĝi pri Esperanta monsisistemo, kiun en la jaro 1950 nove fondis Universala Ligo (la nuna UEA). Temis pri memstara tutmonda monsisistemo ne nur por internaciaj kaj naciaj Esperantaj institucioj, asocioj, kluboj, sed ankaŭ por unuopaj esperantistoj. Oni atendis, ke same kiel Esperanto je la lingva nivelo, ankaŭ la nova monsisistemo kontribuos al plisimpligo de la merkatoj kaj ceteraj financaj fluoj inter tutmondaj internaciaj kaj naciaj Esperanto-asocioj.

Monunuo de la nova monsisistemo estis “stelo”. Unu stelo prezentis unu kilogramon da pano, sed praktike ĝi respondis al kvarono de nederlanda guldeno.

En la supre menciita jaro estis eldonitaj stel-pagbiletoj (stel-kuponoj) po 1 stelo, 5 steloj kaj 10 steloj, presitaj sur blanka papero en la koloroj verda, ruĝa kaj helbruna. Bedaŭrinde mi trovis ilin nenie, por ke mi almenaŭ vidu kaj ankaŭ prezentu ilin por vi, kiel ili aspektas.

Universala Ligo (UL) decidis en la jaro 1959, okaze de la 100-jara naskiĝjubileo de L. L. Zamenhof, cirkuligi la monerojn po 1, 5 kaj 10 steloj, stampitajn en nederlanda ŝtata monerfarejo en kvanto po 10 mil pecoj de ĉiu valoro. La tiama ĝia direktoro d-ro Hengel transdonis ilin ofice al estraranoj de UL en junio 1960.

Artproponojn de la moneroj preparis la tiama vicprezidanto de UL, s-ano Andreo Cseh. En 1965 estis stampita eĉ la 25-stelmonero el oro – nur 10 pecoj kaj la sama valoro el arĝento, sed ĝia kvanto ne estas konata.

La moneroj estis libere haveblaj por centoj da esperantistoj dum Universala Kongreso de Esperanto en Nederlando en 1960.

Ĉi tiu monsisistemo en Esperantujo bedaŭrinde ne sukcesis. La nuna UEA disvendadis la monerojn dum 90-aj jaroj de la pasinta jarcento al interesatoj nur kiel suvenirojn. Unu kompleto da moneroj (sen la ora valoro de 25 steloj) kostis ĉ. 60 tiamajn germanajn markojn.

Por numismatikistoj kaj eĉ por la esperantistoj, jenaj Esperantaj moneroj estas interesaj kaj prezentas malgrandan numismatikan rarajon.

-ijk-



Legu kaj ĝuu

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com




Celebrado de legado


Ĉu vi scias, kio estas “celebrado de legado”? Ne multaj homoj tion scias. Plej ofte ni dediĉas nian tempon al legado nur tiam, kiam ni havas liberajn tagojn, do kiam ni nenion faras. Ni traktas tiam legadon kiel “anstataŭan” aŭ “festan” agadon.


Vera leganto ne flankenmetas legadon, ne legas nur tiam, kiam li/ŝi enuiĝas aŭ kiam la komputilo kaj televido ne funkcias. Vera leganto legas ĉiutage, ĝuas ĉiun momenton de legado kaj la legado fariĝas tre kerna parto de lia vivo. Vera leganto scias, ke legado estas parto de nia homa vivo





kaj donas al ni sperton, helpas trovi vivsencon, kompreni nin mem kaj fariĝi pli bonaj. Ĉu vi celebros legadon? Antaŭ ol vi respondos la demandon, tralegu ankoraŭ kelkajn citaĵojn:


 *Legado de libroj estas la plej bela ludo, kiun al si mem elpensis la homaro.*
Wisława Szymborska


 *Kiu legas, vivas duoble.*
Umberto Eco


 *Kiu pretendas saĝecon, tiu devas ami libregojn pli multe ol arĝenton kaj oron.*
Jan Amos Komenský


 *Ĉiu libro estas ja viva estaĵo ... Ĉiu havas animon kaj ĉiu havas koron.*
Kornel Makuszyński.

 *Legado de bonaj libroj estas kiel interparolo kun plej bonegaj homoj de pasintaj tempoj.*
Kartezio

 *La libro kaj ebleco de legado estas unu el plej multaj mirakloj de la homa civilizo.*
Maria Dąbrowska

 *La libroj estas kiel akompano, kiun la homo mem elektas.*
Montesquieu

 *Kiam mi tralegas novan libron, mi sentas, ke mi trovis novan amikon. Kiam mi tralegas denove iun libron, mi sentas, ke mi renkontiĝis kun malnova amiko.*
Ĉina proverbo



Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo sendu al la supra adreso maldekstre, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Rekomendo

Por la Biblioteko de Juna Amiko Jose de J. Campos Pacheco el Kubo, kunlaboranto de nia revuo, rekomendas la libron de la brazila verkisto Monteiro Lobato "O sitio do Picapau Amarelo" (La flava bieno de pago).

En bieno, kiu nomiĝas Picapau Amarelo, loĝas vidvino Dona Benta kun genepoj, Pedrinho kaj Narizinho. La bienon vizitas ankaŭ bestoj, ekzemple



inteligenta azeno Conselheiro, rinocero Quindim, kiu forkuris el cirko, kaj nobla fiŝo Príncipe Escamado. La bienon vizitis ankaŭ nekredeblaj herojoj, kiel ekz. Peter Pan. Ĉiuj travivas multajn aventurojn, malkovras aliajn mondojn kaj eĉ kosman spacon.

Legante la libron ni ekkonas brazilan folkloron, spurante vivon de la feo Saci, kiu loĝas en ĝangalo. Ne mankas ankaŭ gravaj rimarkoj de la avinjo Dona Benta kaj ŝia kuiristino Nastacia kaj priskriboj de multaj humuraj situacioj.

Legante "O sitio do picapau Amarelo" ni lernas amikecon, solidarecon kaj bonkorecon, sed ankaŭ kiamaniere protekti la naturon.

Monteiro Lobato skribis sian verkon inter 1920 - 1947. Ĝi konsistas el 23 volumoj. "O sitio do Picapau Amarelo" estis filmita kaj prezentita en la brazila televido ekde la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento, danke al O Globo de Brazilo. La tuta serio estis tre ŝatata de infanoj. Tiu libro estis ankaŭ en la jaro 1979, eldonita kiel bildstrio.





Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

Konkurso ne nur por junaj legantoj

Septembre en la konata vrocava biblioteko okazis prelego de ukraina esperantisto Oleg Pokotylo pri lia lando, pri Ukrainio. La prelego estis dediĉita al lia amata avo Bogdan kaj kelkfoje ĝi kortuŝis la publikon.

Kio allogas min en Ukrainio?

Ukrainio (ukraine Україна) estas ŝtato en orienta Eŭropo, kun la ĉefurbo Kievo. La unusola oficiala lingvo de Ukrainio estas la ukraina, sed daŭre estas vaste uzata ankaŭ la rusa lingvo, kiu dum la Sovetia tempo estis oficiala. La ukraina registaro ĝenerale subtenas la politikon de ukrainigo kaj do la uzado de la ukraina lingvo en ĉiuj sferoj de la socia vivo pligrandiĝas.

La vorto Україна (legu *Ukrajina*) devenas de la malnov-rusa vorto, kiu signifas “tranĉaĵo” kaj do “tranĉita aŭ prenita tero

aŭ lando”. Ekde la 16-a jarcento la nomo de la ŝtato estas jam uzata en la moderna senco, kaj do kiel la lando loĝata de ukrainoj.

La ŝtataj simboloj de Ukrainio estas la flago, blazono kaj himno. La flago estis akceptita la 28-an de januaro 1992 kaj ĝi estas dukolora: helblua supre (simbolas la sennuban ĉielon), flava malsupre (simbolas vastajn kampojn de matura tritiko). La blazono prezentas specifan formon de tridento, kiu estas tre antikva simbolo de la 10-a jarcento. La tekston de la ŝtata himno verkis Pavlo Ĉubinskij en 1862 kaj la melodion komponis la pastoro Miĥajlo Verbickij.

Ukrainiaj kulturo kaj tradicioj devenas de tre malnova tempo. Dum sia evoluo ili estis grave influitaj de la orientaj kaj okcidentaj najbaroj de Ukrainio.

En la mondo vaste konataj estas la ukrainaj priprenitaj paskaj ovoĵoj (ukraine писанка) kaj la broditaj ĉemizoj (ukraine вишиванка). En ĉiu regiono de Ukrainio ekzistis unika etna grupo, kiu havis





www.kemko.org





1710 estis verkita kaj samtempe anoncita la konstitucia dokumento de la hetmano Fylyp Orlyk. Ĝi estis unika en sia historia periodo, ĉar ĝi estis unu el unuaj ŝtataj konstitucioj en Eŭropo. Tamen, la projekto de Orlyk por sendependa ukraina ŝtato neniam realiĝis.


Ĉu vi scias, ke...


 “Arsenalna”, konstruita en la jaro 1960, estas la plej profunda metrostacio en la mondo (105 m). Ĝi situas en Kievo.

 La plej vizitata manĝejo en la mondo estas en Ukrainio kaj ĝi estas McDonald's.

 La plej granda dezerto en Eŭropo troviĝas en Ukrainio, en la Herson-regiono kaj nomiĝas „Ukrainia Sahara” kaj havas 160 milojn da hektaroj.

 La plej longa muzika instrumento en la mondo estas „huculska trembita”. Ĝia longeco estas 4 metroj kaj sonas al pli ol 10 kilometra distanco.

 La plej granda aviadilo AN-225 “Mrija” (Revo) en la jaro 2001 prenis 253 tunojn de kargo, tiumaniere anoncis novajn 124 mond-rekordojn.

 La fama opera kantistino Solomia Krušelnytska (ukraine Со́ломія

apartan stilon de broditaj ĉemizoj kaj proprajn tradiciojn. Jam Herodoto skribis pri tiuj belegaj brodaĵoj. En Ukrainio estas kutimo donaci al beboj broditan ĉemizeton, kredante, ke ĝi havas protektan celon kontraŭ malbonaj spiritoj. Tradicie ĉiu junulino devas brodi ĉemizon al sia estonta edzo. Ivan Franko, unu el la tri kolonoj de la ukraina poezio, adoptis kaj miksis tradician stilon kun modernaj vestaĵoj.

La plej tradiciaj ukrainaj manĝaĵoj estas barĉo (ruĝa el ruĝaj betoj kaj verda el rumeksa), varenikoj (ukraina pastaĵo) kaj lardo. Monde konataj estas la kieva kokinaĵa kotleto kaj la kieva torto. Dum festaj renkontiĝoj ukrainianoj trinkas bieron, vinon kaj horilkon (ukraina nomo por vodko). La familiaj roloj en la ukrainiaj familioj estas tradiciaj kaj do viroj ĉefe respondecas pri mon-akirado kaj la virinoj pli ofte respondecas pri la hejma mastrumado. Gravan rolon pri edukado de la genepoj ludas geavoj.


La areo de Ukrainio estas 603.628 km² kaj tio estas ĉirkaŭ 5,7 % de la tuta teritorio de Eŭropo. Tio signifas, ke Ukrainio estas la plej granda lando, plene situanta en Eŭropo.


Ukrainio dum sia tuta historio batalis pri sendependeco. Tion ĝi ricevis nur la 24-an de aŭgusto 1991 kaj tiu dato estas festata kiel la Tago de Sendependeco. Oni devas menciigi, ke la 5-an de aprilo





Крушельницька) en Parizo, en la jaro 1934, kantante en la ukraina, gajnis la trian lokon (post la franca kaj persa) laŭ sekva kriterioj: fonetiko, leksiko, frazeologio, strukturo de frazoj. Laŭ melodio ŝia kanto gajnis la duan lokon (post la itala).

 Ukrainian urbeton Raĥiv oni oficiale agnoskis la geografia centro de Eŭropo.

 La ukraina alfabeto havas 33 literojn kaj la plej ofta litero estas “o” – kaj plej ofte vortoj komenciĝas per la litero “p”.

Legendo

En la ukraina vilaĝo Maniawa (ukraine *Манява*, sur la dekstra foto, sube) troviĝas la monaĥejo Skit Maniawski. Vi certe dezirus scii kial ĝi tiel nomiĝas, ĉu?

Antaŭlonge vivis Jan Kniehynicki. Li estis filo de riĉa nobelulo. Iun tagon la juna Jan estis petita viziti la monton Athos, por donaci al monakoj valorajn donacojn. La monakoj akceptis la donacojn kaj bone gastigis Jan, montrante la monakejon kaj rakontante detalojn de la monaka vivo.

Juna nobelo estis ravita per la asketa vivo de monakoj kaj tuj fariĝis unu el ili. Tamen li ne portis simplan monakan veston, sed akran harteksajon. Li nomis sin Ijob kaj komencis serĉi solecan lokon, kie li deziris anakorete vivi. Tiun lokon li trovis en arbaro, meze de torentoj, proksime de la vilaĝo Maniawa. Tie

helpo de monakoj konstruis ortodoksan preĝejon kaj konstruaĵon kun ĉeloj. En tiu loko monakoj vivis ege modeste kiel asketoj kaj iun tempon poste oni komencis nomi ĝin Skit Maniawski.

La konkursa tasko estas jena: **Unue** denove tralegu citaĵojn, kiuj estas en la parto „Celebrado de legado” kaj sekve skribu el kiuj landoj devenas la aŭtoroj de la citaĵoj. **Due** trovu la najbarajn landojn de Ukrainio sur la mapo. Skribu iliajn nomojn al ni. **Trie** respondu sekvajn demandojn:

- 1 Kion signifas la koloroj de la ukraina flago?
- 2 Kiu verkis tekston de la ukraina himno?
- 3 Kial oni donacas broditajn ĉemizojn al beboj?
- 4 Ĉu ekzistas verda barĉo?
- 5 Kiu lando estas la plej granda kaj plene situanta en Eŭropo?
- 6 Kio okazis la 5-an de aprilo 1710?
- 7 Kio estas “Arsenalna”?
- 8 Kie troviĝas geografia centro de Eŭropo?

Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) prezentas la tekston de la legendo.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 30-a de januaro 2018 al la adreso de la rubrikestrino.

La valorajn premiojn fondis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.





Malstreĉiĝu kun Juna Amiko

Preparu bildon el sekigitaj plantoj – la kristnaskan arbon!

Mi proponas al vi dediĉi iom da tempo al kreado de bildoj el elementoj de sekigitaj plantoj. Vi povas ilin sekigi la tutan jaron, ekzemple enmetante ilin inter foliojn de libroj. Tiu laboro estas bona ludo, sed antaŭ ĉio ĝi montras riĉecon de nia naturo en ĉiu jarsezono. Preparado de la bildoj instruas al ni paciencon, krea pensadon, imagkapablon, eluzadon de senutilaj aŭ forvelkintaj plantopartoj, sed ankaŭ faras nin sendependaj de televido aŭ komputilo kaj do promocias sanan vivmanieron.

Mi petis vroclevan artistinon Elżbieta Wodała, ke ŝi preparu kaj priskribu bildon de kristnaska arbo, speciale faritan por *Juna Amiko*. Faru similan kristnaskan arbon kiel donacon por viaj proksimuloj.

Materialoj: Blanka kartono de la formato A4, blanka emulsia farbo, peniko larĝa ĝis 2 cm kaj peniketo, gluo por ligno, pinĉileto, viŝtuko, mato, kolora kartono pli granda ol la formato A4, diversaj sekigitaj plantoj.



Priskribo: Blankan kartonon de la formato A4 por blanka emulsia farbo. Sur la mato metu maldekstran flankon de filika folio. Ŝmiru ĝin per gluo kaj delikate per pinĉileto turnu kaj transportu sur la sekan kartonon. Delikate alpremu. Troabundon de gluo forviŝu per viŝtuko. Kiam la folio estos seka, algluu trunkon de la arbo (vidu la foton). Tio estas fundamento de nia kristnaska arbo. Algluu piedestalon de la arbo, el 4 verdaj florfolioj de zinio. Algluu ornamajojn: • ora stelo sur la pinto de la arbo estas floro de ranunkolo; • kristnaskaj globoj estas faritaj el duonoj de fruktoj de alizarboj (ruĝaj kaj flavaj), el maturaj fruktoj de nigra sambuko kaj el ruĝaj folioj de berberiso; • aliajn kristnaskajn ornamajojn preparu ekzemple uzante malhelajn semojn de alceo, floretojn de neforgesumino (miozoto), rozkolorajn kampanulojn, florfoliojn de akvilegioj...;

• kristnaskajn donacojn preparu el verda parto de la kukurba floro, el miniatura malhelblua petunio, floroj de violo kaj verbeno, el “lipharoj” de verda latiro; • ĉirkaŭ la kristnaska arbo estas punktetoj, faritaj el semoj de kapsikoj. La faritan bildon gluu sur koloran kartonon, kiu kreas bildkadron.

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj ŝatokupoj, kun la priskribo, por ke la legantoj de *Juna Amiko* povu ekkoni ilin.





La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie...

Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, kaj ebligas revii aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo.

Mi prezentas la ŝatatan kanton de infano "Saĝulo", de nekonata aŭtoro. Ĝin rekomendas Françoise Noireau, emerita instruistino, esperantistino, kiu violonas por animi kaj dancigi. Kantante ĝin infanoj mangestas, montrante la konstruadon, la pluegon, la diluvon kaj la sorton de la domo.

Saĝulo



*Saĝulo konstruis domon sur la rok',
(3-foje)*

poste venis granda pluv'.

Pluvegis, kaj akvo levis sin (3-foje)

sed la domo ne falis.

*Sur sablo konstruis domon frenezul',
(3-foje)*

poste venis granda pluv'.

Pluvegis, kaj akvo levis sin, (3-foje)

kaj la domon forportis!

Nekonata

SAĜULO

Sa - ĝu - lo kon - stru - is do - mon sur la
 Sur sab - lo kon - stru - is do - mon fre - ne -
 rok', sa - ĝu - lo kon - stru - is do - mon sur la
 zul', sur sab - lo kon - stru - is do - mon fre - ne -
 rok', sa - ĝu - lo kon - stru - is do - mon sur la
 zul', sur sab - lo kon - stru - is do - mon fre - ne -
 rok', pos - te ve - nis gran - da pluv'. Plu -
 zul', pos - te ve - nis gran - da pluv'. Plu -
 ve - gis kaj ak - vo le - vis sin, plu - ve - gis
 ve - gis kaj ak - vo le - vis sin, plu - ve - gis
 kaj ak - vo le - vis sin, plu - ve - gis kaj ak - vo
 kaj ak - vo le - vis sin, plu - ve - gis kaj ak - vo
 le - vis sin, sed la do - mo ne fa - lis.
 le - vis sin, sed la do - mon for - por - tis.

Bonvolu respondi:

1. Kiu estas saĝulo kaj kiu frenezulo? 2. Kie konstruis la domojn la saĝulo kaj la frenezulo? 3. Ĉu estis pluva aŭ suna vetero? 4. Kio okazis kun la domoj de la saĝulo kaj la frenezulo? 5. Desegnu la domon de la saĝulo aŭ/kaj la frenezulo.

Viajn respondojn sendu al mi por ricevi valorajn premiojn, kiujn fondis pola organizaĵo Eŭropa Centro de Interkultura Edukado. Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.



Surpriza koncerto

Mi estas komencanto de Esperanto el Subotica (Serbio), studentino de la Muzika Fakultato, la fako Instruisto de violonĉelo. Mi studas en Debrecen (Hungario), malproksime de mia familio.



Komence de aŭgusto mi akompanis mian patrino al la Esperanta evento INTER-fest en Bjelovar (Kroatio).

Tiu kelktaga ekskurso estis bona okazo esti kune kun mia patrino, kaj krom tio, ankaŭ por muzikludi. Mi kunportis mian instrumenton, ĉar mi ricevis de la organizantoj inviton por partopreni en la festivala programo per muzikaj eroj. Mi ludis suitojn de Johan Sebastian Bach antaŭ la prezento de la vivo kaj laboro de la fama esperantisto Ivo Lapenna, kies ŝatata instrumento estis ĝuste la violonĉelo. Dua mia muzika intermezo – denove suitoj de Bach – okazis dum la deklamkonkurso, la trian tagon de la festivalo.

La internacia lingvo ŝajnas al mi simpla, kaj eniro en tiun medion estis por mi tre interesa. Allogis min la ebleco lerni,


ekzerci la lingvon, kaj motivigis min kiam mi komprenis iom, kaj kiam mi sukcesis ekparoli. Pro tiuj specialaĵoj la Esperanto-festivalo fariĝis por mi neforgesebla. Kaj ne nur pro ili...

Surpriza kaj tre bela travivaĵo estis por mi la konatiĝo kaj kunmuzikado kun la fama operkantisto, esperantisto Neven Mrzlečki el Zagreb (Kroatio), unika muzika animo. Li per gitaro akompanas dum li kantas en diversaj lingvoj. Dum INTER-fest li havis tri koncertojn, unu el ili estis nure Esperanta. Mi rakontos pri tiu ĉi koncerto, ĉar ĝi fariĝis speciala por mi.

La trian tagon, dum la paŭzo post la deklamkonkurso en la Altlernejo, mi konatiĝis kun Neven Mrzlečki kaj ni interparolis. Li rakontis pri la muziknumeroj el sia repertuaro. Subite li pridemandis, ĉu mi ŝatus kunmuziki kun li, ludante la ĉefan melodion en unu kanto... kaj ĉu ankaŭ en la alia.... Nur unu horon post la ekesto de la ideo pri la unua kanto jam komenciĝis la menciita koncerto. Surprizo por mi kaj ankaŭ por la publiko. Belegaj, korvarmigaj kantoj, ĉiuj Esperante. Neven kantis kaj ludis gitaron, kaj mi akompanis partojn de kelkaj kantoj. La ebleco kunmuziki kun li estis granda honoro por mi. Lia fido al mi kaj lia malfermiteco impresis min. Mi riĉiĝis je interesa travivaĵo, valora sperto, kaj je nova amiko.

Blanka Laslo





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_esperto@mail.ru



Projekto "Esperanto-Poŝtkruciĝo"

Saluton, karaj legantoj!

Vi sendube konsentos kun mi, ke ni, esperantistoj, estas tre kreemaj homoj. Ĉu? Ja tra la tuta mondo ni organizas diversajn Esperantorenkontiĝojn, okazigas ekspoziciojn, konkursojn, realigas projektojn kaj aliajn variajn aranĝojn. Tiu agado konvinke montras al la homaro la vivecon kaj utilecon de Esperanto kiel neŭtrala ponto-lingvo inter popoloj.

Nia rubriko jam multe rakontis pri diversaj interkulturaj iniciatoj de esperantistoj. Ĉi-numere temos pri la nova internacia projekto pere de Esperanto – "Esperanto-Poŝtkruciĝo" – EoPK. Ĝi estas Esperanta versio de *Postcrossing* (angle).

Postcrossing estas projekto, kreita por ricevi bildkartojn el diversaj landoj pere

de speciala aŭtomata sistemo. La ideo naskiĝis en Portugalio en la jaro 2005. La unua poŝtkarto estis sendita samjare ene de la lando inter du studentoj. La miliona bildkarto estis sendita jam en 2011.

En 2017 la anoj de la Moskva Esperanto-Asocio "Moskva Amikaro de Studentoj kaj Instruantoj" (MEA MASI) decidis krei Esperantan version de tiu monda projekto. Tiel naskiĝis EoPK. Ĝi estis lanĉita la 25-an de marto 2017. La inicianto de tiu ĉi projekto estas Irina Gonĉarova, la gvidantino de MEA MASI.

Kiel kaj kial naskiĝis la ideo? Iam ordinara poŝto estis la sola ilo por komuniki kun homoj tra la distancoj. Kiam aperis Esperanto, ĝuste leteroj kaj bildkarto estis la unua eblo por pruvi internaciecon de nia lingvo.

En oktobro 2013, omaĝe al la grava komunikilo de la Esperanta pasinteco, Moskva Esperanto-Asocio MASI organizis la unusemajnan agon "Esperanto-Poŝtkruciĝo".





Ĝi estis dediĉita al la Tutmonda Tago de Poŝto (la 9-a de oktobro) kaj al la “Internacia Semajno de Leter-skribado”, proklamitaj de la Tutmonda Poŝta Unio en 1969. La eksperimento bonege sukcesis kaj eĉ trafis sur la paĝojn de la revuo “Esperanto” (№ 1274 (11), Novembro-2013).

En 2017 MASI-anoj decidis restarigi la Poŝtkrucigon por esperantistoj de la tuta mondo kaj fari ĝin seninterrompa aktivado. Jam dum la unua monato de la funkciado (25.03-25.04.2017) al EoPK aliĝis 67 homoj el 17 landoj. En la sociaj retejo aperis 20 raportetoj pri sendo-ricevo de la bildkartoj.

Pere de tiu projekto MASI-anoj celas interŝanĝon de bildkartoj inter esperantistoj el diversaj landoj de nia planedo. Oni povas sendi iujn ajn poŝtkartojn: kun vidindaĵoj de sia lando aŭ regiono. Kun portretoj de iuj famaj personoj, pri kiuj la sendanto volas sciigi siajn samideanojn. Kun bildoj de diversaj interesaj okazaĵoj kaj tiel plu, tiel plu, tiel plu... Ja oni povas sendi eĉ sian foton, enmetitan en bildkarton. La ĉefa kaj nepra




postulo – la bildkartoj devas esti mane surskribitaj en Esperanto. La lingva nivelo de la sendanto ne gravas. Necesas kaj sufiĉas nur simpla amika mesaĝo. Ĝin povas verki ne nur komencanto, sed ankaŭ homo, kiu nenion scipovas en Esperanto. “Kiel tio eblas?” – vi demandos. Tute simple.

Por realigo de la projekto MASI-anoj kreis propran paĝaron <http://bildkarto.weebly.com>. Ĝi estas ornamita per Esperanta verda koloro kaj donas ĉiujn bezonatajn klarigojn. Ĉiuj, kiuj deziras partopreni la projekton, devas plenigi tre simplan aliĝilon. Kaj poste li aŭ ŝi tuj ricevos adreson de antaŭe aliĝinta samlingvano. La adreso estos hazarde elektita el la listo de ĉiuj aliĝintoj. Do, vi havos surprizon ricevi belegan bildkarton el tute nekonata por vi loko. Aŭ el tute malproksima de vi regiono de nia vasta mondo. Ĉu tio ne estas plezuro?

Por komencantoj MASI-anoj preparis klaran gvidilon, kiel skribi simplan amikan mesaĝon. En la ĉefpaĝo estas ligiloj al la paĝoj, kie situas komprenebla instrukcio “Kiel surskribi bildkarton en Esperanto”. Tie la aŭtoroj proponas ŝablonan tekston de la mesaĝo. Krome, ili donas mallongan lecionon pri Esperanto por kompreni enhavon de tiu ŝablona teksto. Do, okazas fakte ekspresa leciono, kiun kapablos kompreni eĉ homo, kiu tute ne scias Esperanton.

Nun tiuj instrukcioj funkcias en la paĝaro en kvar naciaj lingvoj: la rusa, la franca, la itala kaj la portugala. Aliaj lingvoj “staras” en la vico. Do, eble vi tradukos kaj preparos la sekvan paĝon, karaj legantoj? Des pli, ke la organizantoj zorgis ankaŭ en tiu kampo





pri klara modelo por tradukado. Serĉu ĝin en la ĉefpaĝo de la projekto laŭ la koncerna ligilo.

Post aliĝo de nova partoprenanto la interŝanĝo funkcias tre simple. Ĉiu novulo dum unu monato devos sendi bilde interesan poŝtkarton al la ricevita adreso. Intertempe la adreso de la novulo jam estos en la komuna listo. Dum monato ĝi povos esti kelkfoje aŭtomate sendita al aliaj listanoj. Tial ĉiuj partoprenantoj ricevdos dum unu monato pli da kartoj, ol ili sendis. La 25-an daton de ĉiu monato la aŭtomata sistemo dissendas al ĉiu listano novan hazardan adreson por sendi bildkarton. Kaj la projekto daŭros. Tute simple, tamen allege, ĉu ne?

Por disvastigo kaj evoluo de la projekto la organizantoj petas la partoprenantojn iom raportoti pri sia agado. Tiucele estis kreitaj koncernaj grupoj en sociaj retoj *Vkontakte* kaj *Facebook*. Rigardante ilin, vi trovos multe da interesaĵoj kiel pri la projekto mem, tiel pri la homoj-partoprenantoj. Kaj vi vidos vere neordinarajn kaj unikajn bildkartojn.

En la paĝaro de la projekto la organizantoj proponas ankaŭ simplan modelon de tiu raporteto: ekzemple, "La 29-an de marto 2017 Mirina sendis bildkarton al Portugalio".

Por faciligi la interŝanĝon, la sistemo post aliĝo aŭtomate kompilos informon pri novulo por liaj/ŝiaj partneroj. La modelo de tiu informo same situas en la ĉefpaĝo

ESPERANTO-POŝTKRUCIĜO

ĈEFAĜO NIA GEOGRAFO PODROBNE...



Esperanto-Poŝtkruciĝo invitas vin partopreni interŝanĝon de poŝtkartoj kun esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj.

Aliĝu, se plezurigis vin elektadi plaĉan bildkarton kaj surskribi ĝin mane, per simpla skribilo. Kaj poste trovi en via poŝtkesto bildkarton de ti el ĉi kun amika mesaĝo en Esperanto!

f e

Kiam vi ekhavos emon sendi pli ol unu bildkarton, plenigu la formularon. Via mendo estos unuopa, ĝi ne funkcios por ĉiu monato!

Certe, vi jam devas esti aliĝinta al EoPK.

Kiel surskribi bildkarton en Esperanto

[FR \(franca\)](#)
[IT \(itala\)](#)
[PT \(portugala\)](#)
[RU \(rusa\)](#)

Se vi volas helpi al necesaristoj partopreni EoPK, verku por ili instrukcion en via nacia lingvo laŭ la ŝablono.

MI DEZIRAS SENDI PLI OL 1 BILDKARTON

de la projekto. Ĉiu deziranto rajtas partopreni la projekton. Ekzistas neniu limigiloj, krom unu, kiel estis jam dirite: la kartoj devas esti surskribitaj en Esperanto.

MASI-anoj proponas diversajn temojn por bildkartoj: vidindaĵoj, desegnitaj bildoj, libraj ilustraĵoj, arto, naturo, homa vivo, sporto, Esperantaj eventoj, gratulkartoj kaj eĉ reklamoj. Do, por ĉiu prefero kaj gusto. La listo de temoj estas proponata jam en la aliĝilo.

Ĉiu partoprenanto estas petata sendi unu bildkarton. Tamen, se oni deziras sendi pli, la projekto antaŭvidas





specialan servilon. Vi trovos ĝin same en la ĉefpaĝo de la paĝaro. Sur la aparta paĝo “Nia geografio” situas mapo de la projekto. Tie vi povas vidi regionojn de la Terglobo, kiuj partoprenas en la interŝanĝo. Ili estas verde kolorigitaj. La mapo estas konstante aktualigata. La prizorgantoj regule sendas informleterojn pri realigado de la projekto. Laŭ la nuna stato, proksimume duono de la Terglobo estas “verda”. Tio signifas, ke dum malpli ol unu jaro partoprenas en la projekto jam 38 landoj kaj 169 korespondantoj. Bona statistiko por nur sep monatoj de realigado de la projekto, ĉu? En la koncerna paĝo sub la mapo vi vidos liston de la landoj kaj povos serĉi la vian. La paĝaro inkluzivas ankaŭ paĝojn kun oftaj demandoj kaj kontaktoj. La organizantoj penis antaŭvidi ĉiujn eblajn embarasojn aŭ hezitojn kaj helpi al la partoprenantoj.

MASI-anoj organizas enkadre de la projekto diversajn konkursojn, intervjuas homojn pri ilia partopreno, prezentas novaĵojn en Esperanto-komunikiloj. Ĉe YouTube MASI kreis sian propran kanalon “Esperanto: la Unua kanalo!” («Эсперанто: Первый канал!»).

La projektanoj alvokas ĉiujn aliĝi al la interŝanĝo. Unue, tio estas tre interesa. Due, vi ekhavas novajn amikojn tra la tuta mondo. Trie, espereble, vi “kreos” novajn esperantistojn. Kaj kvare, vin atendas multaj agrablaj surprizoj. Do, vizitu la retpaĝojn <https://bildkarto.weebly.com>,

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-Po%C5%9Dtkruci%C4%9Do>, aŭ malfermitajn grupojn en sociaj retoj <https://www.facebook.com/groups/1421463748076350/>, <https://vk.com/bildkarto>. Krome, la projekto bezonas kaj serĉas helpojn en tradukado al naciaj lingvoj. Ju pli da tradukoj estos, des pli da homoj ekscios pri Esperanto.

Do, karaj legantoj de *Juna Amiko!* Aliĝu al la projekto mem kaj aligu viajn amikojn! Tio ankaŭ kontribuos al la disvastigo de nia lingvo. Krome, iĝu kunlaboranto kaj kunhelpanto de tiu interesa projekto, aŭ proponu tion al viaj amikoj. Tio same estos okazo interesi pri Esperanto aliajn homojn. Tiam, ni esperu, ke ne nur duono, sed la tuta Terglobo ekhavas verdan koloron: la koloron de espero. Espero al la paco, reciproka interkompreno kaj estimo, amikeco inter la popoloj. La koloron de Esperanto!

Interkultura Mondo esprimas koran dankon al la gvidantino de MEA MASI Irina Gonĉarova (Mirina) pro la disponigitaj materialoj.





Raita Pyhälä

Helsinki Julopado... Pado al Kristnasko

La Julopado de Helsinki okazas ĉiujare en la insulo Seurasaari/
Fölisön, en iu decembra
dimanĉo.

Multegaj homoj volontulas; la organizoj subtenas finance. Por la publiko la Julopado estas senpaga multhora aventuro kaj distraĵo en duonsovaĝa arbaro, inter rokoj, marbordaj fragmitoj kaj sablo.

La pado komenciĝas posttagmeze ĉe blanka mallarĝa lignoponto, kiun ornamas verdaj girlandoj kaj kronoj kun ruĝaj bantegoj. Gvidantino disdonas mapetojn pri la pado kun ties trideko da haltejoj, kie okazas la programeroj. Ĉiuj venantoj piediras: familioj, geavoj kun



genepoj, turistoj, soluloj. Ĉiuj atendas ion ĝojigan kaj belan. Apud la ponto, en akvo, en loketo, kiu ankoraŭ ne kovriĝis de glacio, naĝadas kaj plonĝadas du junaj brunetaj cignoj kaj pluraj anasoj. La bruo de la urba trafiko, la zorgoj pri parkumejo kaj tro plenaj busoj, la ĉiutaga laboro forgesiĝas.

Ni unue haltu ĉe ne-dekoritaj arbetoj, malaltaj piceoj, kiuj aspektas kiel abietoj. La arbetoj atendas, ke infanoj pendigu sur la branĉojn ornamaĵojn, memfaritajn kaj kunportitajn. Kelkaj el la infanoj





vestis sin kiel jul-koboldoj: ruĝa pinta ĉapo, ruĝaj vestaĵoj. Mi rimarkis ankaŭ hundegon en ruĝa surtuto. Tio aspektas amuze! Koboldece vestitaj plenkreskuloj instruas al ludemuloj rondancojn kaj kantojn. Kelkaj infanoj ŝatas subengliti laŭ roko, kiun kovras maldikta tavolo el glacio. Plenkreskuloj devas atenti siajn paŝojn. Etuloj amuziĝas, faladante kaj ridante, regrimpante la deklivon supren. Ili ŝatas glitajn akvoflakojn, fakte ĉiun ejon, kie eblas gliti kaj petoli.

Sekve mi vizitas la poŝtoŝtationojn de la Jul-avo. Ĝi plenplenas de desegnantoj, sendontoj kaj scivolemuloj. Diligente laboras la maljuna koboldo, kiu stampadas la sennombrajn sendaĵojn per speciala stampo. La poŝtoŝtationa varmo kaj lumo tre plaĉas al la envenintoj, ĉar ekstere blovas vento kaj la temperaturo estas – 8 minusaj gradoj. Faladas iom da neĝo, ne veraj flokoj, sed kvazaŭ pudro en la aero.

La plej junaj partoprenantoj ekmalŝatas. Al ili estas proponata varma rizokaĉo kun cinamo, sukero kaj lakto. Plenkreskuloj ne rajtas regali sin per ĝi; ĝi estas nur por la infanoj. La akompanantoj aĉetu por si varman trinkaĵon kun pano aŭ dolĉa bulko. Oni povas sidiĝi ĉe longaj tabloj, kovritaj de ruĝaj tukoj, sub tegmento, sed tra la muroj blovas vento, ĉar la kafejo estis origine ejo por stoki ĉarojn kaj laborilojn de malnova bieno. En la insulo staras pluraj trabaj konstruaĵoj tien transportitaj kaj muzeigitaj por montri, kia estis la kampara vivo antaŭ jarcentoj. En ilin oni rajtas eniri nur somere kaj paginte. Nun en la malnova stokejo helruĝaj hiacintoj bonodoras sur la tabloj kaj lumas kandeloj, kiel ĉie ĉirkaŭe.

Kien iri poste? Ĉu al la ŝtuparo de ligna preĝejo de la 18-a jarcento? Tie geknaboj prezentas Kristnaskan evangelion: Jozefo, Maria, paŝtistoj, ŝafoj, fine eĉ la Magoj. Oni kantas plej konatajn Kristnaskajn



kantojn kaj himnojn. Aliloke oni voĉdonas por la plej bela spicokuko. La kukoj staras sur breto, diversformaj kaj kun diversaj “desegnaĵoj”, kiujn la bakistoj faris per farbata sukero kaj ovoblanko.

Krepuskiĝas; la vetero malvarmiĝas, baldaŭ la Julopado estos fermita. Mi vidas solecan vulpon serĉi kaŝejojn en la malumo inter grandaj piceoj. Certe ĝi ne povas kompreni, kial tiom da bruoj, lumoj kaj homoj okupis la insulon hodiaŭ. Tio ja okazas nur unu fojon jare.





Luiza Carol

Trezoro de porinfanaj poemoj

“Ni vagu kune!” de Bertram Potts, Chapecó-SC (Brazilo), 2009, 108 paĝoj. Kovrilaj ilustraĵoj: William B. Jenks. Internaj ilustraĵoj: Samicler, Susana Volz, Adriano Vazaha, Sinara Klaus, Clahito Corona.

Tiu libro estas vera trezoro de 70 belsonaj, humuraj poemoj, originale verkitaj en Esperanto. Instruistoj pri Esperanto povas ĉerpi el ĝi amason da simplaj, klaraj, amuzaj kaj artecaj versaĵoj, facile memoreblaj por infanoj. La temoj estas tiom buntaj, kiel la temoj de la ludoj inventitaj fare de la infanoj mem. Fakte, multaj poemoj ŝajnas speguli gajajn ludojn de infanoj.

Kelkaj poemoj estas tiom belsonaj kaj ritmoplenaj, ke ili ege taŭgas por deklamado, kantado kaj eĉ dancado. Jen ekzemplo el la muzikoplana poemo “Du brunaj paseroj”:

*Tri idojn prizorgis du brunaj paseroj,
du brunaj paseroj, du brunaj paseroj,
tri idojn prizorgis du brunaj paseroj
dumtage diligente.*

*Fiere kaj ĝoje du brunaj paseroj,
tri brunaj paseroj, kvar brunaj paseroj,
fiere kaj ĝoje kvin brunaj paseroj
kunflugis tre kontente.*



Inter la protagonistoj de la poemoj abundas bestoj, kiuj kutime interrilatas diversmaniere kun infanoj. Kelkfoje temas pri realismaj bestoj, aliffoje pri pluŝbestoj, parolantaj bestoj aŭ bestoj kiuj kondukas kiel homoj.

En la poemo “La bruna bovino”, la protagonisto, kiu estas infano, priskribas humure bovinon kaj ties vivon el sia propra vidpunkto, kaj konkludas:

*Mi certe ne volas
esti bovino -
al mi multe plaĉas
kukoj kaj kino!*

En alia poemo “Bovino revas”, ni konatiĝas kun la vidpunkto de la bovino pri la vivo de la homoj. Ĝi longe monologas pri la homa “sintendo nesentema kaj bizara” kaj konkludas:

*Mi tre ĝojas, ke mi estas nur bovino
kun humila sorto - mia vivdestino!*



Kutime la poemoj estas ŝercaj kaj gajaj, sen moraligaj ekzemploj, ĉar ili tute ne celas fariĝi rimitaj lecionoj. Tamen troviĝas almenaŭ unu ŝerca poemo pri bestoj, kiuj ja finiĝas per moraliga konkludo, kaj tial oni povus konsideri ĝin fablo. Tiu amuza fablo estas “La akrobata araneo”, kie stulta kaj vanta araneo, imitante homojn kiuj akrobatas en cirko, fariĝis pli kaj pli ambicia kaj famavida. Sed evidentiĝis, ke troa ambicio multekostas... Jen la ŝerca finaĵo:

*Ĝi ekprovis neeblaĵon kaj okazis retobreĉo,
kie ĝi fiksiĝis node malgraŭ pena fortostreĉo,
kaj formanĝis ĝin la muŝoj, kiuj lipoleke festis,
ĝis nenio, nur ridado pri stultulo, fine restis.*

Malsimile al la stulta araneo, la tri amikoj en la poemo “Tandemo trisidloka” estas pli singardaj kiam ili sportumas. La triopo konsistas el kato, hundo kaj bovo. Ĉar bovo evidente pezas pli ol ajnaj hundoj kaj katoj kune, ni povas supozi ke al ili estas malfacile ekvilibri la tandemon... Ĝuste tiu manko de ekvilibro igas la situacion komika. Sed la tri bestoj estas amikoj kaj persistas en sia deziro promeni triope per tandemo trisidloka. Ili ja sukcesas admirinde sportumi teame:


*Ili ciklis bonekzemple kaj neniam ajn freneze
kaj kunkantis bleke, boje kaj miaŭe,
kaj la kato stiris kape kaj la hundo sidis meze
- kun la bovo, kompreneble, malantaŭe.*

Tamen okazas akcidento, kiam la bremsoj malfunkcias ĝuste dum promenado sur monteto kaj la tandemo malsuprenĝlitas rapidege, faligante la tri amikojn meze de bazaro. (Sur la malantaŭa kovrilo vi trovos ilustraĵon ĝuste pri la momento, kiam la tandememuloj rapidĝlitas suben sur la deklivo.) Nu, akcidentoj ja okazas en la vivo... Sed ekvilibro gravas ne nur en sporto, sed ankaŭ en la tuta vivsinteno.

Ekvilibro en la vivo signifas eviti troigojn, do eĉ pri prudento ne indas troigi, t.e. ne indas definitive ĉesi bicikli, nur pro tio ke kelkfoje povus okazi akcidentoj. La saĝa triopo ne konfuzas prudenton kun malkuraĝo. La malagrabla evento igas ilin eĉ pli prudentaj, sed tamen ili kuraĝas aĉeti novan tandemon kaj daŭrigi siajn gajajn promenadojn:

*Ili novan trisidulon serĉis kaj tre baldaŭ havis
la plej lastan, por ĝuadi, kiam sune,
kaj ankoraŭ unu fojon la rajdado ilin ravis
- ili blekis, bojis kaj miaŭis kune.
Ili ridis kaj kondutis ĉiam bone kaj kompleze,
ĉu la vento blovis milde aŭ kontraŭe,
kaj la kato stiris kape kaj la hundo sidis meze
- kun la bovo, kompreneble malantaŭe.*

En la libro troviĝas kelkaj poemoj pri la delikata rilato inter infanoj kaj plenkreskuloj. En la poemo “Legu ĝin denove, Paĉjo!”, la protagonisto estas la aŭtoro mem, kiu rememoras pri sia





infanaĝo, kiam lia patro laŭtleĝis por li fabelojn kun entuziasmo, humuro kaj aktora talento. La maljuna aŭtoro supozas, ke lia patro estis tiam rememoranta sian propran infanecon kaj iusence sentis sin denove infano:

***Povas esti, ke li ekvojaĝis sur memoro-maro
kaj refoje tra la junaj jaroj dravis.
Tiufore ni fariĝis ĝoja infaneto-paro,
tiel febrovarme ni korvibre vivis.***

Min aparte emociigis la poemo “Onklo Karlo”. Tie la protagonistoj estas du: infano kaj ties onklo (plenkreskulo kompreneble). Tiu relative longa poemo estas samtempe tre amuza kaj tre pensiga. La onklo estas ege maloptimisma, deprimita, ĉiam plendas pri siaj propraj malfeliĉoj kaj ankaŭ pri tiuj de la tuta homaro. Sen ĝui la belan veteron kaj la bonajn aspektojn de sia propra vivo, la onklo rakontas pri malsanoj, tertremoj, inundoj, militoj, poluado de la tuta tero, malpliboniĝo de la homa karaktero... Li konkludas:

***La estonteco vere nigra estas
kaj tempo por nin savi ne plu restas!***

Feliĉe, la neвето de la plendema Karlo estas gaja kaj sana infano, kiu klopodas ĝojigi sian onklon. La nevo diras ame kaj bonintence:

***Almenaŭ, Onklo Karlo, ni kunĝuu
la ravan tagon kaj ĝin ne detruu!***

La 4-paĝa versa dialogo inter la deprimita onklo kaj la senzorgema nevo estas ege amuza, sed ankaŭ sufiĉe maltrankviliga. Vidu, kiam temas pri rilatoj inter plenkreskuloj kaj infanoj, okazas dilemoj ambaŭflanke. Ni, la plenkreskuloj, ne volas deprimi kaj suferigi la junajn animojn de la infanoj, rakontante al ili tro da detaloj pri la

realaj malfeliĉoj, okazantaj en la mondo. Aliflanke, se oni tute silentus pri malĝojigaj aferoj, tio signifus ne eduki la infanojn por elteni kuraĝe la veron, kiun ili pli aŭ malpli frue ja malkovros. La solvo de tiu dilemo ne estas facila, sed plej ofte la plenkreskuloj, kiuj vere amas la infanojn, sukcesas trovi ekvilibron tiudirekte: ne malkuraĝigi la infanojn, sed ankaŭ ne mensogi al ili. Ankaŭ la infanoj havas sian dilemon: ĉu serioze priatenti la vortojn de deprimitaj kaj deprimantaj plenkreskuloj, aŭ senpripense ignori ilin? Kaj kompreneble indas solvi la problemon kiel eble pli ekvilibre: respekte aŭskulti la plendojn de la plenkreskuloj, por ne imagi ke la tuta vivo estas gaja ludo, sed malgraŭ tio...
“ni kunĝuu la ravan tagon kaj ĝin ne detruu!”

Kion vi opinias pri tio? Ĉu vi konas plenkreskulon kiu troigas siajn plendojn kaj malkontentojn? Ĉu vi provas kuraĝigi lin aŭ ŝin? Ĉu vi trovas sufiĉan forton en via animo por helpi lin aŭ ŝin reakiri almenaŭ etan parton el la infanaĝa espero, kiun bedaŭrinde ni, la plenkreskuloj, perdas kelkfoje dum kelka tempo... ? Laŭ mi, indas legi tiun poemon tre atente kune kun iu plenkreskulo, kiu amas vin kaj kiun vi amas. Ĉar mi supozas, ke ĉiuj plenkreskuloj havas siajn momentojn en la vivo, kiam ili similas pli-malpli al la komika onklo Karlo. Eĉ tiuj el ni, kiuj kaŝas al vi tiajn momentojn, ja travivas ilin en la menso, se mi ne eraras. Almenaŭ pri mi mem, mi povas konfesi, ke mi ja havas kelkfoje momentojn de granda malespero. Sed mi batalas kontraŭ tiaj momentoj, provante revivigi en mia animo la sanan optimismon de mia infanaĝo. Kiel mi faras tion? I.a. legante belajn porinfanajn librojn, kiel ekzemple tiun ĉi poemaron de Bertram Potts, kaj kundividi kun vi miajn emociojn...

Ĝuu la legadon de tiu poemaro, junaj amikoj!



Luiza Carol:

La Stelkaroto

“Ni estas faritaj el la sama materialo kiel la sonĝoj.”

(William Shakespeare)

Jen ĝi! Jen la stelkaroto, sur la blua breto de mia kuirejo! Kion mi faru? Kion mi decidu? Kion vi farus, se vi estus mi?

Pluis tiun tagon de julio, la lastan fojon kiam mi vidis mian amikon Ĉielarko. Li estis gastinta ĉe mi dum du semajnoj kaj tiutage jam preparis sin por reveni hejmen. Sian trajnbileton li jam aĉetis, sed ankoraŭ ne decidis, per kiu trajno foriri. La trajnhoraron li metis sur la tablon, sub la florzavetono, el kiu freŝa taraksako ŝajnis rigardi nin. Kiam li enmetis la floron tien? Li verŝajne vekigis multe pli frue ol mi kaj gimnastikis en la ĝardeno. Ekde kiam li venis al mi, ĉiumatene aperis nova floro en la vazeto, sed neniam mi rimarkis, kiam li alportas ĝin...

Ĉielarko kaj mi ekamikiĝis unu jaron antaŭe, pere de la virtuala mondo Dua Vivo, kie ni ambaŭ ĉeestis en prelegoj, kunvenoj kaj spektakloj en Esperanto. Iom post iom ni malkovris, ke ni havas multegajn komunajn interesojn kaj renkontiĝis pli kaj pli ofte tie, en la artefarita mondo. Ĉielarko estis la nomo de lia “avataro” tie, sed ni ambaŭ kutimiĝis uzi la nomojn de niaj “avataroj” ankaŭ tie ĉi, en la reala vivo. Do li nomis min Abio, kaj mi ŝatis tion.

Mi estas ĉirkaŭ 36-jara viro, kiu loĝas en malgranda domo, proksime de la vilaĝa lernejo, kie mi instruas historion kaj Esperanton. Mi estis sola komence de julio, tuj post la separiĝo de mia eksedzino. Mi ĝojis havi dum la ferio agrablan gaston, kiu forigu mian solecon. Ni ankaŭ planis, ke mi




Foto de Jozefo Nemeth, de vera karoto, kreskinta en lia ĝardeno.

vizitu lin je la mezo de aŭgusto. Nun estas la mezo de aŭgusto. Hodiaŭ mi devas decidi, ĉu mi vizitu lin.

Ĉielarko estas biologo, preskaŭ 10 jarojn pli juna ol mi, vegetarano samkiel mi, emas naĝi kaj bicikli, amas la naturon, interesiĝas pri historiaj kaj sciencfikciaj romanoj... Ni pasigis bonan tempon kune.

Nun, kiam mi rememoras tiujn du semajnojn, dum kiuj ni babilis ĉiutage, kune piediris kaj biciklis, kune vizitis muzeojn en la granda apuda urbo... nun, mi opinias, ke li ja estis iom stranga... Tamen, pasintmonate, mi apenaŭ rimarkis tion. Mi ne volas diri, ke lia aspekto estis stranga. Ne, ne. Li aspektis tiom ordinara kiel sia avataro, kvazaŭ li estus ties kopio: averaĝa alteco, averaĝa dikeco, averaĝa vestaĵo... Eĉ averaĝajn inteligentecon kaj klorecon li ŝajnis posedi, kiam oni babilis kun li pri bagatelaĵoj. Sed kiam temis pri seriozaj aspektoj de la vivo, li ŝajnis multe pli matura ol mi, malgraŭ sia aĝo. Li ĉiam evitis paroli pri sia propra vivo, sed li instigis min paroli pri la mia. Ĉielarko ŝajnis havi tre seriozajn konojn pri historio, kaj kiam li faris nur hazardajn komentojn pri la nuna monda politiko, mi tuj sentis min kiel infano fronte al lia profunda pensmaniero. Kelkfoje li ŝajnis aŭdi miajn pensojn, sed tio ne ĝenis min. Male, tio donis al mi bonan senton de amikeco kaj fido, kaj tial mi faris al li





longajn konfesojn pri io ajn, kio pasis tra mia cerbo...

Mi faris al li kelkajn demandojn pri lia lando, liaj familianoj, liaj geamikoj... Li ĉiam respondis: “Ne gravas, pri tio ni havas amason da tempo paroli kiam vi estos mia gasto, venontmonate. Nun la ‘turisto’ estas mi, kaj do ni parolu pri via lando, via vivo, viaj planoj pri la estonteco...” Dunja, lia koramikino, ne povis akompani lin ĉi tien, sed ili alvokis unu la alian ĉiujn kelkajn horojn kaj parolis longtempe. Li insistis paroli “nur duope” kun ŝi, kaj tial li ĉiufoje iris en kiel eble pli izolitan lokon por babili trankvile per poŝtelefono, malproksime de ies oreloj. Por ne ĝeni ilin, mi ne faris tro multajn demandojn pri tio. Mi neniam vidis la foton de tiu junulino, kun kiu li babiladis. Foje mi demandis lin, ĉu li havas ŝian foton en sia poŝtelefono. “Foto?!” li miris, kvazaŭ mi faris strangegan demandon. Poste, kvazaŭ li rememorigintus ion, li diris: “Ha, foto! Mi komprenas... Ne, mi ne havas ŝian foton.”

Kaj venis la lasta tago de lia vizito. Lia valizeto atendis tute preta apud li. La trajnhoraron li metis sur la tablon, sub la florvazeton.

“Kara Abio” – li diris – “mi volas fari al vi gravan konfeson.”

Mi ne estis tro surprizita. Mi iel estis diveninta, ke li kaŝas ion. Mi montris al li tiom da fido kaj varmo, ke ŝajnis al mi tute natura lia deziro rompi lian sekretemon. Mi tuj supozis, ke li volas ekloĝi ĉe sia koramikino, kaj estos al li malfacile reciproki mian gastigemon venontmonate, laŭ la promeso. Tio ne estintus por mi grava afero. Mi povintus atendi alian okazon por viziti lin. Ni jam estis tre bonaj amikoj, kaj do mi ne ofendiĝintus pro bagatelo.

“Mi estas... aliplanedano...” – li deklaris hezite, embarase, kvazaŭ li mem pridubus siajn vortojn.

Mi ekridis. Li embarasiĝis eĉ pli.

“Pli ekzakte, mi estas... avataro de aliplanedano. Mia avataro estas ĉi tie, dum

mi mem estas hejme, en fora galaksio, fronte de sfera ekrano por tridimensiaj imagoj. Por mi, tie ĉi estas iusence mia ‘Tria Vivo’. Jen ĉio.”

Li estis tre serioza. Mi subite ektimis.

“Ne timu, Abio...” – li diris milde.

Mi maltrankviliĝis, demandis min, ĉu li aŭdas miajn pensojn.

“Mi ne aŭdas viajn pensojn, sed sentas viajn emociojn... mi ne kapablas klarigi kiel... Nun mi sentas ĉe vi timon, koleron, malfidon... Ne indas timi, Abio. Mi ja estas via amiko.”

Mi jam kredis lin. Sed mi sentis min ofendita, perfidita. Mi fidis lin tutkore, kaj akceptis lin kiel fraton... dum li mensogis pri sia deveno, sia identeco... mensogis pri ĉio.

“Mi ne povintus klarigi al vi tion ekde komence” – li diris, por senkulpiĝi.

Mi ne konsentis. Kial li ne povintus diri la veron? Li devintus demandi, ĉu entute mi volas akcepti tian strangan estaĵon en mian domon, ĉu ne?

“Mi estas homo, samkiel vi, el biologia vidpunkto. Mi volas diri ke tie, kie mi estas nun, ĉe mia sferkomputilo, mi estas homo kiel vi, el biologia vidpunkto. Sed tio kion vi vidas nun, estas mia avataro. Tiu estas farita el la sama materialo, kiu konsistigas sonĝojn. Jen... jen...”

Antaŭ miaj okuloj Ĉielarko aliformis sian vizaĝon, sian korpon... Poste li reprenis la antaŭan formon.

“Ne timu, mi ne estas monstro en la realo. Fakte, tiun ĉi avataron mi konstruis ĝuste laŭ mia reala formo. Vi ne havos surprizon, kiam vi konos min sur mia planedo. Mi aspektas ĝuste tia ĉi.”

Do, li ja supozas, ke mi vizitos lin. Kial mi risku fari tian strangan vojaĝon?

“Ne timu. Vi nenion riskos. Vi restos trankvila apud via komputila ekrano, samkiel okazas dum viaj vojaĝoj en Dua Vivo. Vi vizitos min pere de avataro, samkiel mi faris ĉi tie. Se vi laciĝos aŭ ne ŝatos ion, vi simple ĉesigos la ludon.”

“La ludon!” – mi kriis. “Vi parolas pri ludo! Honesta ludo postulas interkonsenton, ĉu ne? Kiam ni interkonsentis ludi? Mi fidis vin, dum vi ludis kun mi. Mensogulo vi estas!”

Ni kverelis longtempe tiun matenon. Mi ekkoleris kontraŭ li, kaj ne povis pardoni lin.

Antaŭ ol foriri, li diris:

“Mia invito validas, Abio. Se vi volos viziti min... mi akceptos vin tutkore, kiel avataran gaston, je la jam fiksita dato.”

“Kial mi plu fidu vin, mensogulo?” – mi respondis kolere.

“Mi neniam mensogis” – li diris.

Tiam mi furioziĝis: “Fulmotondro! Ĉu vi ne diris tute klare, ke vi loĝas sur la tero?!”

“Jes” – li diris. “Sed tio ja veras. Mi ja posedas loĝejon sur la tero, tian kiel mi priskribis al vi. Veran loĝejon. Mi ofte gastigas konatojn tie. Ankaŭ vin mi povintus inviti tien sen konfesi ion ajn, kaj tiukaze vi verŝajne estintus kontenta. Provu kompreni, Abio... Ĝis nun, mi neniam fidis ajnan teranon sufiĉe, por konfesi la tutan veron. Fakte, vi estas mia unua vera amiko sur tiu ĉi mondo. Mi ege bedaŭrus, se mi perdus vian amikecon...”

“Kaj via koramikino? Kion pri ŝi? Ĉu ankaŭ kun ŝi vi ludas la saman filudon?”

“Dunja estas mia samplanedano. Mi jam diris al vi, ke ŝi ne havis tempon akompani min ĉi-somere, ĉar ŝi preparas sin por trapasi gravan ekzamenon. Ŝi studas genetikon. Kiam vi vizitos min, vi ekkonos ankaŭ ŝin.”

Kelktempe ni silentis. Mi pensis, ke eble li estas freneza.

“Mi diris nenium mensogon” – li insistis.

“Mi nur prisilentis parton de la vero. Tio akcepteblas eĉ inter plej bonaj amikoj. Fakte neniun diras ĉion al aliulo. Homo kiu ambicius rakonti ĉion pri si... devus esti ege teda, ĉu ne?”

El racia vidpunkto li pravis. Ankaŭ mi prisilentis diversajn aferojn... Sed tiuj ne estis tiom gravaj!

“Mi pardonpetas...” – li diris malgaje.

“Mi ne volis ofendi vin. Mi esperas, ke vi

akceptos min tia, kia mi estas... kaj tre ĝojus, se vi decidus viziti min. Abio, antaŭ kelkaj tagoj mi plantis karoton en via ĝardeno. Ĝi troviĝas ie, apud la tilio. Tio estas mia donaco. Ne temas pri ordinara karoto. Ĝi kreskos stelforme, iom malsimile al normala karoto. Ĝi kreskos dum ĉirkaŭ 3 semajnoj, poste vi povas elterigi ĝin. Musoj aŭ leporoj ne tuŝos ĝin, ĉar ili ne rekonos ĝin kiel karoton. Se vi montrus ĝin al teranaj biologoj, ili dirus, ke ĝi estas tute ordinara legomo, sed ke nur ĝia formo estas iomete malkutima. Tio, kion mi enmetis en ĝin, estas farita el la sama materialo kiel la homaj songoj. Nur por vi mi kreis ĝin. Nur por via korpo kaj menso ĝi efikos. Mi elpensis tiun donacon pro granda amikeco, esperante, ke vi akceptos ĝin. Kiam vi estos preta viziti min sur mia planedo, sufiĉos boligi kaj manĝi la stelkaroton. Via cerbo ekkapablos formi avataron, kiu aperos ĉe la pordo de mia domo. Vi gvidos tiun avataron pere de via komputilo, laŭ maniero, kiun mi klarigos al vi tiutempe. Ne hezitu. Ne rifuzu al vi la plezuron pliriĉigi vian vivon per tiu travivaĵo. Fidu min, Abio. Mi neniam trompis vin.”

Li etendis la manon por adiaŭi, sed mi rifuzis etendi la mian. Li malaperis.


Jen ĝi! Jen la stelkaroto, sur la blua breto de mia kuirejo! Ĝi similas oranĝkoloran polpon... Sed polpojn mi timas kaj malŝatas. Kial mi kuraĝus meti en la buŝon tiom strangan aĵon? Supozu, ke Ĉielarko estas malica perfidulo, kiu donis al mi danĝeran legomon? Supozu ke, se mi mergus ĝin en bolantan akvon, la aĵo aliformiĝus en monstron? Supozu ke, la aĵo multiplikiĝus subite per la sama rapideco, per kiu mikroboj multiplikiĝas... Tiam la tuta tero estus rapide invadita de avidaj detruemaj karotpolpoj...

Sed, se li estis sincera? Fakte, li povintus manĝigi min danĝeran legomon sen mia scio, ĉu ne? Kaj estintus al li pli facile agi



10-vorta krucenigmo

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



1 2 3 4 5 6 7 8 9 10


1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

EN AMBAŬ DIREKTOJ:

1 – Tuto de skribaj verkoj.
2 – Kompleksa kaj nereala (mat). 3 – Ero de fum-materialo.
4 – Unuformigo. 5 – Orienta du-rada veturilo tirata de viro. 6 – Membrego. 7 – Pezo de pakmaterialo. 8 – Formortinta bovo.
9 – Kemia simbolo de radiumo. 10 – Vokalo.

Krucenigmo-solvo el la antaŭa numero

	S	E	S			
K	O	R	E	A	J	
I	C		U	L	U	L
M	I	E	L	O	N	
Ĉ	A	N	O	J	A	
N	I	L	O	N	O	N
O	A	S		N	O	



tiel, ol igi min sopiri pri lia ĉeesto. Ĉar jes, li mankas al mi. Mi troreagis. Li pravas, amikoj ne diras unu al alia ĉion, kion ili faras aŭ pensas. Aliflanke... se oni kaŝas antaŭ amiko ĝuste la esencon de sia vivo... ĉu tio signifas veran amikecon? Hmmm... Kion signifas la esenco de onia vivo? Ĉu aparteno al specifa loko aŭ specifa raso estas la plej grava eco, per kiu oni identigas homon? Ĉielarko

estis gaja, sentema, ŝercema, sportema... Li babilis kun mi pri la terana historio, terana muziko... Ĉu ĉio, kion li ja kundividis kun mi, estas malpli grava por difini lian personecon, ol tio, kion li sekretigis? Fakte, li eĉ ne sekretigis sian devenon tro longe... Kial, fakte, aliplanedano fidu dekomence kaj senkondiĉe tute nekonatan teranon? Kial ni, teranoj, meritus tian fidon? Eble se mi decidus travivi similan sperton sur lia planedo, mi estos eĉ pli malfidema kaj sekreta ol li, flanke de nekonataj aliplanedanoj... Kial? Oni ne povos mortigi min. Oni eĉ ne povos kapti min. Sed kial mi fidu aliplanedanojn? Eble ili ja povas kapti min kaj utiligi por sciencaj esploroj... Kaj kiu povas certigi al mi, ke la stelkaroto ne malutilos al mia sano? Ĉu mi anoncu tion al la polico? Bah, oni kredus, ke mi frenezigiĝis. Mi havas nenian pruvon pri lia vizito.

Kion mi faru? Kion mi decidu? Kion vi farus, se vi estus mi?

Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; info@esperanto.org.au. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; aon.913548977@aon.at. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; financoj@fel.esperanto.be. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; belabutiko@esperanto.org.br. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; eab@esperanto.org.uk. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; mrvp@interpres.org; ilei@espereto.com. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; polnickypavel@seznam.cz; cea.polnický@quick.cz. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; strigo@esperanto.cl. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; arko.gong@qq.com. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 Koebenhavn; arnecasper@yahoo.com. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Parnumaa; ahto.siimson@esperanto.ee. **Finnlando:** Hämäläinen Sylvia, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; sylvia.h@kolumbus.fi. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; esperanto-france@esperanto.org.net. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; wolfgang.schwanzer@esperanto.de. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; zsofia.korody@esperanto.de. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thokoly ut. 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; simio_2004@yahoo.es. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; esperanto@isli.is. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-53490 Givatajim; saviogp@netvision.net.il; esperantisto@live.com. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; silkovojo@aliceposta.it. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; esperanto@jei.or.jp. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; marija@hes-keu.hr. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; irenaa@takas.lt. **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; akbondhus@jkn.no. **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; gddewar@ihug.co.nz. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; mtatara@gmail.com. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; asocio@esperanto.pt. **Rumanio:** Crancau, Ioan, B-dul Bucuresti 5/53, RO-4800 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; sezonoj@mail.ru. **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; zciric2@gmail.com. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; petro@ikso.net. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B lgh 1303, SE-931 38 Skellefteå; leif.holmlund@telia.com. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; ch_scheidegger@bluwin.ch. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; rezamenhof@yahoo.com. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome, Togo; esp.togo@cafe.tg. **Usono:** Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530; eusa@esperanto-usa.org. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; uea@uea.org. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** ilei.officejo@gmail.com.

46-a Internacia Infana Kongreseto en Seulo, Koreio



La 47-a IIK okazos 28 jul – 04 aŭg 2018 en Sesimbra, Portugalio, kaj ĝia temo estos “Delfenoj kaj dinosaŭroj”. Vidu: <http://bertosch.free.fr/iik2018/>